**Numero: 259.**
**Decembro: 2013.** **21-a jarkolekto**

# Literaturaj Folioj

# VESPERTO





**Redaktanto:**
**Apáti Kovács Béla**
**Kaposvár**
**Béla király u. 44.**
**H-7400 HUNGARIO**
**Telefono: 82/ 410-664**
**Retadreso: espbela@t-online.hu**
**Eldonanto: Kapoŝvara Esperanto Centro**
**Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet**

# Jesueto, venu al ni!

( - Kristnaska fabelo - )



Inter altaj montoj fore de la mondo estis eta vilaĝo. Tie ĉi vivis malriĉa familio. La patro jam delonge ne trovis laboron kaj el la kamero mankis manĝaĵo.

Pro tio ili suferis multe.

Alvenis la frosta vintro. La homoj estis ene en sia dometo kaj sidadis apud la varma forno atendante la printempon, kiam la kampoj kaj arbaroj denove verdos kaj floros. Inter la arbobranĉoj birdetoj trilos pri la bela vivo.

La malriĉa familio apenaŭ povis hejti, ĉar ili ne havis monon por aĉeti lignon. El la ĝardeno jam estis forbruligita ĉio, nur malgranda abio staris apud la barilo.

La patro kaj la patrino estis tre malgajaj. Ilia fileto malsane kuŝis en la lito. La kuracisto ekzamenis la etan malsanulon kaj li konstatis, ke la knabeto grave malsaniĝis.

-Jen recepto! - diris la kuracisto. - Iru al la vilaĝa apoteko kaj aĉetu medikamentojn! Rapidu, ĉar via fileto estas grave malsana. Se li ne povos ricevi la medikamentojn, li mortos ĝis mateno. Do rapidu!

La patrino ekploris.

-Sinjoro doktoro, ni estas tre malriĉaj homoj. Nia monujo estas malplena. Ni ne povas aĉeti la medikamentojn.

La viro diris nenion. Li nur sidis ĉe la tablo kun griza, trista mieno. La viroj ploras laŭte nur malofte, sed ene iliaj larmoj bruligas la koron kaj disboras la animon. Jam la kuracisto estis forironta, kiam li ekparolis:

-Kion ni faru, sinjoro doktoro?

La kuracisto retrorigardis kaj haltis ĉe la duone malfermita kuireja pordo.

-Vendu ion, kion vi jam ne bezonas - diris indiferente la kuracisto kaj li iris el la domo.

-Sed, kion? - ĝemis la viro kaj li demandante rigardis al sia edzino, kiu amare ekploris.

La knabeto timige tusis en la ĉambro kaj malforte petis helpon de siaj gepatroj:

-Panjo, paĉjo, mi ege malbonfartas. Venu en la ĉambron. Mi tre timas.

La virino tuj enkuris la ĉambron kaj sidiĝis sur la randon de la lito. Ŝi viŝis la varmegan frunton de la knabeto per mola, malseka tuko.

-Mi estas tie ĉi - ŝi diris milde. - Ne timu mi estas kun vi!

-Kie estas la paĉjo? - li demandis per sia malforta voĉo.

-Li estas en la kuirejo. Baldaŭ li alportos al vi la medikamentojn kaj vi rapide resaniĝos.

-Panjo, post kelkaj tagoj estos Kristnasko.

-Jes, kara mia - respondis larmokule la virino. - Nun ne parolu. Ripozu! Jesueto helpos resaniĝi. Mi scias.

-Ĉu ankaŭ al mi venos Jesueto?

-Jes.

-Ĉu mi ricevos de li donacon kaj belan ornamitan abion?

-Certe, karuleto, sed nun ne parolu, ĉar tio lacigas vin. Estus bone, se vi povus dormi iomete.

-Bone mi dormos - li ekridetis. - Mi sonĝos pri Jesueto.

-Sonĝu fileto mia! - diris la virino kaj ŝi kuregis plorante el la ĉambro.



La viro ankoraŭ sidis ĉe la tablo kaj li fikse rigardis unu punkton sur la planko. Li ne sciis, kion fari? Kion vendi el la domo por ke li povu aĉeti la medikamentojn. Krome al kiu li povas vendi ion ajn. Tiutempe la vilaĝanoj ne deziras aĉeti uzitajn aĵojn. Diabla rondo. Li ne sciis, kiel solvi ĉi tiun situacion. Vane li estus iranta al la najbaroj por peti monon. Jam neniu pruntas al ili, ĉar ili neniam povas redoni ĝin.

Kion vendi kaj al kiu?

Pri nenio li povis pensi. Nenio enmemoriĝis al li. La viro nur sidas en la kuirejo senmove. Lia edzino venis el la ĉambro kaj ŝi timeme demandis:

-Kion fari nun?

La viro longe ne respondis. Pasis pezaj minutoj ĝis li mallaŭte elbuŝigis:

-Ni havas nenion valoran por vendi.

-Iru al via kuzo kaj petu de li iom da mono!

-Ĉu laŭ vi li povos doni? Ankaŭ ili estas malriĉuloj, kiel ni. Ni povas fari nenion. Filo nia mortos.

-Tion mi ne volas – ekkriegis histerie la virino, kaj ŝi komencis kuregadi tien kaj reen en la kuirejo. Mia filo ne mortos. Ja, li apenaŭ vivis. Li ankoraŭ estas malgranda kolombeto. Se li mortos, tiam ankaŭ mi sekvos lin. Mi murdos min en tiu momento, se mia karega fileto forlasos ĉi mondon. Mi petegas, bonvolu elpensu ion, sed fulmrapide.

La viro nur balancadis siam cindrokoloran kapon kaj fine malgaje alrigardis sian plorantan edzinon.

-Mi estas senkonsila. Bedaŭrinde. Ne koleru!

Sekvis longa silento en la domo. Jam ankaŭ la virino ĉesis plori. Ŝiaj larmoj elĉerpiĝis. Nur foje – foje aŭdiĝis ilia senespera ĝemado.

Ili ne vidis la solvon. Certe en la kapo ili jam prepariĝis al la entombigado. Antaŭ iliaj okuloj ekaperis la vintra, neĝa tomboĝardeno kun profunda, nigra tombo, kiu froste atendas la malgrandan korpon de ilia anĝeleto.

La virino ne povis elteni la neniofaron. Ŝi eniris la ĉambron kaj sidiĝis al la lito de sia fileto kaj tie li plorante preĝis.

La knabeto endormiĝis. Lia frunto estis varmega. Ŝajne jam ankaŭ la malseka tuko apenaŭ helpis.

Dume la patro iris el la domo. Glacia vento ekfrapis lian vangon kaj tio tuj ruĝiĝis. Li sentante malvarmon interprenis la kolumon de sia vintra mantelo kaj li ekiris.

Verdire li ne sciis, kien iri. Prefere nun li irus el la mondo forgesiĝante pri ĉio.

Unue lia vojo kondukis al la kortobirdoj. Li indiferente rigardis la kokinojn kaj unu kokon, kiel ili skrapadis la frostan teron. Sed ili trovis nenion. Li iris en la kameron kaj de tie li ĵetis kelke da maizosemoj al ili. La kokinoj kun koko feliĉe kuregis post la flugantaj maizosemoj kaj ili tuj malaperigis la ricevitan manĝaĵon.

„Almenaŭ ili estas kontentaj.” – pensis la viro kaj li iris plu.

Ankaŭ nun li ne sciis la celon de sia irado. Vintre li ne kutimis iri al la ĝardeno. Kion fari tie, kiam ĉio estas frosta kaj glacia. La grundon kovris malgranda neĝo apenaŭ kovrante la surfacon. Kelkloke ankoraŭ nigre vidiĝis la tero. Onidire ĉi vespere aŭ nokte alvenos granda neĝo je Kristnasko.

„Kiom belega estas Kristnasko kun granda, blanka neĝo.” – li pensis suprenrigardante al la ĉielo – „Infanaĝe li ĉiam malpacience atendis tiun ĉi admirindan feston.

Li staris en la ĝardeno kaj li rigardis la arbojn kaj la postrestaĵojn de la iamaj kreskaĵoj. Ĉi vintre tro frue alvenis la frosto kaj neĝo. Tial li ne povis fari ordon. Tion ĉi li ege hontis. Alifoje li ĉiam ĝustatempe finis la ĝardenajn laborojn.

Ĉe la najbara barilo staris abio. Ankoraŭ somere li decidis dehaki ĝin por Kristnasko. Li planis, ke ĝi estos belege ornamita kaj ili diros al la knabeto: „Jesueto portis ĝin kun la anĝeletoj.” Li antaŭĝojis, kiom granda estos la surprizo. Certe lian fileton la bela abio feliĉigos. Ja, ankaŭ li ĉiam ĝojegis al la kristnaska abio, kiam li estis infano. Liaj gepatroj metis donacojn sub la abion kaj ĉi vespere la tuta familio estis tre gaja.

Kia estos nun ilia Kristnasko. Anstataŭ bele ornamita abio staros ĉerko kaj ili adiaŭas de sia unusola fileto.

-Ve, tion mi ne deziras! – li ekkriis en la forlasita ĝardeno. – Dio, se vi ekzistas tie supre en la ĉielo, savu mian filon!

Li eklevis siajn manojn, kvazaŭ de tie li petus helpon. Sed la nubegoj silentis. Ili timige nigriĝis super lia kapo.

Li plu rigardis la abion ĉe la barilo. Ĝi estas bela kaj forma. Ĝi estas vera kristnaska abio. Ĉiu infano ĝojegus, se ĝin portus al li aŭ ŝi la Jesueto. Certe ankaŭ lia fileto, kiu nun agonias en la ĉambro.

Terure! Ne ekzistis vorto per kio li povintus esprimi sian malĝojon.

Li ne sciis kiom longe li estis en la ĝardeno. En lia cerbo diversaj pensoj kirliĝis. La ĉeftemo estis akiri monon por aĉeti la medikamenton. Sed rapide, ĉar la tempo estas tre kruta.

Li prirabos iun – li pensis en sia lasta malespero. – En la vilaĝo estas multaj riĉuloj. Forta bato sur la kapon kaj li jam akiris la dikan monujon. Neniu ekscios, kiu estis la krimfaranto. Li havos monon kaj lia fileto ne mortos.

Jes, li devas fari tion. Li ne havas alian eblon. Li faros tion. Nur tiel li povos helpi al sia malsana fileto.



Li ŝajnis decida. Liaj okuloj flamis timige. Bonŝance en la proksimo ne estis bruligebla materio, ĉar certe liaj okuloj estus bruligintaj ĝin.

Li ĝuste deziris ekiri kiam lastfoje ĵetis rigardon al la abio kaj tiam kvazaŭ ĝi estus dirinta al li:

-Vendu min! Vendu min! Neniu estu prirabita, homo!

**En lia kapo ektintis io. Li haltis kaj ĉirkaŭrigardis. Li vidis neniun en la proksimo. Kiu estus en tia frosta vetero en la senhoma ĝardeno. Neniu. Nur li kaj kelkaj nigraj milvoj, kiuj ne komprenis, kial estas homo tie ĉi. Ili senmove sidis sur la altaj branĉoj de juglando de la najbaro.**

**La viro estis tute konfuzita kaj li sentis, ke li tuj freneziĝos.**

**„Mi jam halucinas." – li pensis amare – „Neniu estas en la ĝardeno krom mi, tamen mi aŭdas voĉojn. Nenion mi aŭdis. Miaj oreloj trompis min."**

**Li volis iri plu, sed tiam la abio denove ekparolis:**

**-Vendu min! El la ricevita mono vi povos aĉeti la medikamentojn. Baldaŭ estos Kristnasko kaj oni volonte kaj multekoste aĉetos min. Portu jam tiun hakilon! Ne hezitu! Do, ek!**

**„Ho, Dio mia prave! – eksaltis grande la viro kaj li kuregis kaj portis la akran hakilon.**

**Post kelkaj minutoj la arbo jam kuŝis sur la glacia tero atendante sian sorton.**

**La animo de la viro iomete trankviliĝis, ĉar ekbrilis la espero de la resaniĝo de lia fileto.**

**Pri tio ĉi edzino sciis nenion. Ŝi estis ene en la ĉambro kun la knabeto kaj preĝis dume ofte interŝanĝis la malsekan tukon sur la rozkolora frunto de la malsanulo.**



**La viro iris al la vendoplaco kun la abio. La homoj mire rigardis al li. „Kion li volas per tiu ĉi unu arbo? Ĉu li aĉetis aŭ vendos ĝin?**

**Ĉe la muroj jam staris multegaj abioj. Ĉiuj atendis, ke ili estu venditaj. La vendistoj konkurante unu kun la alia kriadis:**

**-Aĉetu belan abion! Post kelkaj tagoj estos Kristnasko. Bonvolu aĉeti la miajn. Ili estas la plej belegaj sur la vendoplaco. Mi vendas ilin malmultekoste. Aĉetu ilin sinjoroj kaj sinjorinoj!**

**La viro longe staris inter la aliaj vendistoj, sed neniu volis aĉeti lian belan abion. Ĉirkaŭ li la aliaj vendistoj foje – foje vendis po unu arbon. Se almenaŭ oni demandus lin, kial li staras tie ĉi? Neniu interesiĝis. Neniu demandis kiom ĝi kostas? Tio ege malgajigis ĝin.**

**Eble li vane li dehakis la abion kaj ĝin li devos hejmenporti.**

**La aĉetantoj indiferente preteriris lin kaj ili rapidis hejmen kun grandaj pakaĵoj.**

**La viro senespere staradis tie kun la abio kaj li malgaje rigardis la homojn. Neniu deziris aĉeti de li.**

**„Mi hejmeniras." – li pensis. – „Ankoraŭ vive mi vidos mian fileton kaj mi babilados kun li kelkajn vortojn. Li ne transvivos la morgaŭan tagon."**

**Li komencis prepariĝi. Apud li starantaj homoj mire alrigardis lin kaj ili demandis:**

**-Ĉu vi jam foriras? Ja, antaŭ nelonge vi venis. Kial tiu ĉi granda malpacienceco?**

**Li ne povis respondi. Li nur ĵetis malgajan rigardon al ili kaj li ektiris sian sultron nervoze.**

**Neatendite antaŭ li haltis bone vestita, mezaĝa viro kaj li demandis raŭkvoĉe:**

**-Kiom kostas la abio?**

**-Kio? – li eklevis sian vizaĝon.**

**-Ĉu la abio estas aĉetebla?**

**-Ho, jes! – gajiĝis la viro – Kiom ĝi valorus al vi?**

**-Mi aĉetas vian abion. Bonvolu diri ĝian prezon!**



**La viro estis konfuzita. Li ne sciis kiom peti por la arbo. por li sufiĉus tiom da mono per kio li povus aĉeti la medikamenton en la apoteko.**

**Sekvis longa silento. La aĉetanto malpacience rigardis al li kaj post kelkaj sekundoj li denove demandis:**

**-Nu, kiom ĝi kostas? Diru jam!**

**-Mi ne scias – fine elbuŝigis la viro.**

**-Kio? Ĉu vi ne scias kiom kostas via abio?**

**La viro ne respondis. Li nur malgaje rigardis la teron. En liaj okuloj larmo brilis.**

**-Homo, vi ploras. Kio okazis?**

**Ankaŭ la apudstarantoj strange rigardis al li kaj ili interflustris, sed li ne aŭdis, kion?**

**La aĉetanto denove diris:**

**-Diru prezon! Mi deziras aĉeti vian abion. Kiom ĝi kostas?**

**-Sinjoro, - komencis amare la viro. – Mia fileto estas grave malsana. Mi bezonas nur tiom da mono per kio mi povus aĉeti por li la medikamentojn. Se li ne ricevos la surskribitan kuracilon, li baldaŭ mortos.**

**-Ĉu pro tio vi deziras vendi la abion? – demandis surprize la aĉetanto kaj serĉis ion en la poŝo de la mantelo.**

-Se estas necese. Sen vendado mi ne povas aĉeti medikamentojn.

-Ĉu vi havas nur unusolan arbon?

-Jes, sinjoro. Ĝi kreskis en nia ĝardeno. Antaŭ nelonge mi esperis, ke ĉi abio estos ornamita Kristnaske.

-Ĉu vi ne havos ornamitan abion?

-Ne – venis la kurta respondo. – Sed ne gravas. Mi havas nur unu deziron por ke mia fileto resaniĝu!

La aĉetanto eltiris el la poŝo dikan monujon kaj donis dek mil forintojn al la viro.

-Mi ne povas ŝanĝi la monon. Mi havas eĉ unu fileron. Mi estas malriĉulo.

-Vi ne devas redoni la restmonon. Ĝi estu la via!

La viro preskaŭ svenis pro la surprizo. Li ne pensis, ke ankoraŭ ekzistas bonaj homoj en tiu ĉi kureganta mondo.



La aĉetanto prenis la abion kaj dirante ĝis revidon li foriris.

Li unue ne sciis, kion fari. Li tretis de piedo al piedo. Fine iu apudstaranto diris al li:

-Nun jam vi povas aĉeti la medikamentojn. Do, iru al la apoteko.

La virino ne volis kredi ilian bonŝancon. Ŝi pensis, sia edzo prirabis iun. Sed nun tio ne interesis ŝin. La medikamentoj fulmrapide efikis. La knabeto jam vespere fartis pli bone. Alitage li petis manĝi kaj trinki.

-Panjo, mi estas malsata.

Liaj gepatroj estis ege feliĉaj. La virino tuj faris por sia fileto bongustan tagmanĝon. Eksidiĝante li scivole demandis:

-Ĉi vespere venas Jesueto. Ĉu ne?

La viro kaj virino interrigardis. Kion diri nun al li, ke ĉi Kristnaske ili ne havos ornamitan abion?

Sekvis ĝenaj minutoj, eĉ horoj. La knabeto malpacience atendis Jesueton.

Jam vesperiĝis, kiam antaŭ la domo kamioneto bremsis sur la glacia vojo. Ankaŭ alifoje okazis simila, sed neniu atentis pri ĝi. Baldaŭ fortaj paŝoj aŭdiĝis.

Tri viroj venis kaj portis grandan, bele ornamitan abion kun koloraj pakaĵoj.

-Paĉjo, panjo, venas Jesueto – ekkriis la knabeto ĝoje kaj preskaŭ elsaltis el la lito.

La viro rekonis sian abion, kiun li vendis sur la vendoplaco, kiun aĉetis stranga viro donacante al li monon.

Kaj nun li resendis la arbon bele ornamita kun multaj pakaĵoj.

La tri fremduloj diris nenion krom la saluto. Ili metis la abion en la ĉambron, kie kuŝis la knabeto kaj ili foriris.

La viro vane demandis de ili, kiel ili sukcesis ekscii, kie li vivas. Li ne ricevis respondon. Tio restis por li eterna sekreto. Li sentis, ke ĉi tage ilin trafis neĉiutaga afero. La tuta okazaĵo estas ekstertera fenomeno.

La knabeto estis tre feliĉa. Ankoraŭ li ne havis tian belan Kristnaskon. Liaj patro kaj patrino staras apud lia lito kaj ili ĉiuj admiras la bele ornamitan abion.

Baldaŭ li petis ilin:

-Paĉjo kara, kio estas en la pakaĵoj? Bonvolu malfermi ilin!

Efektive ĝis nun ili rigardis nur la arbon. Ili ne volis kredi al siaj okuloj. Ili lasis flanke la pakaĵojn. La viro iris pli proksimen kaj komencis elvolbi el la koloraj silkopaperoj la donacojn.

Estis granda ĝojo en la familio. Dum kelkaj minutoj amaso da donacoj kuŝis ĉirkaŭ la abio. Estis tie malgranda infanofervojo, fabellibroj, dolĉaĵoj, fruktoj, oranĝo, figo kaj aliaj, eĉ ne mankis belaj, varmaj, vintraj vestaĵoj.

Okazis miraklo. Ilin vere vizitis Jesueto. La knabeto ne vane petegis: „Jesueto, venu al ni!"

-Onklo Adalberto-



# Kristnaskaj bildoj








Kristnaskaj bildoj





